




ESPERANTO JUNAS EN FRANCIO



# JeunEsperanto

*info* 

**Magazine de l'association JEFO**  
**JEFO informas • Trimestriel • Janvier-Mars 1998 • n° 98/ • 25 FRF**



1998 : Nova Jaro ,  
Nova Redaktorino

[www.esperanto.org/jefo](http://www.esperanto.org/jefo)  
Tout  
savoir  
sur J@fo



## JEFO

### JUNULARA ESPERANTISTA FRANCA ORGANIZO

*JeunEspéranto-France*

4bis, rue de la Cerisaie  
75004 PARIS  
3615 ESPERANTO  
www.esperanto.org/jefo  
ou ttt.esperanto.org/jefo

Direktoro de la eldono /  
Directeur de la publication :  
**Bruno Flochon**

Redaktorino / rédactrice :  
**Ludivine Delnatte**

Desegnoj / illustrations :  
**Ludivine Delnatte**

Fotokopiado kaj sendado /  
Photocopie et envoi :  
**Laurent Vignaud**

Kontribuis al tiu numero /  
Ont contribué à ce numéro :

**Bruno Flochon**  
**Alain Fagot**  
**Rose Sanz**  
**Yves Bachimont**  
**Pascal Lécaille**  
**Philippe Bérizzi**  
**Emilie Joly**  
**Coralie Delnatte**  
**Olivier Moreau**  
Dankon al ĉiuj !

Presita komence de marto je 300 ekzempleroj. Por aliĝi al JEFO kaj ricevi regule tiun bulleton, plenigu kaj sendu la aliĝilon en la centraj paĝoj.

La artikoloj en *JEFO-informas* reliefigas la vidpunktojn de ties aŭtoroj, ne nepre tiun de JEFO.


Tamen JEFO permesas al si la rajton publiki aŭ ne tiujn artikolojn.

Represajoj estas permersitaj, kondiĉe ke oni indiku la nomon de la aŭtoro kaj ke JEFO estu informita.

*Imprimé début mars à 300 exemplaires. Pour adhérer à JEFO et recevoir régulièrement ce bulletin, remplissez et renvoyez le bulletin d'adhésion situé en pages centrales.*

*Les articles parus dans JeunEspéranto Info n'engagent que leurs auteurs. Toutefois, JEFO se réserve le droit de publier ou non. Tous droits de reproduction autorisés sous réserve d'indication de l'auteur et de la source et sur simple information à JEFO.*

**ISSN : 265 3853**



## ENHAVO

(Sommaire)

- P. 2 **Kalendaro** / calendrier des rencontres
- P. 4 Appel à candidatures
- P. 5 **Letero de la prezidanto** / mot du président
- P. 6 **IS** / Semaine internationale
- P. 8 **Teatro** / théâtre
- P. 10 **Tago de Eŭropo** / Jour de l'Europe
- P. 11 **Dialog'**
- P. 15 **La Jefo Butik'**
- P. 17 **IASI**
- P. 18 **IS (alia versio)** / Semaine Internationale
- P. 20 **Muziko** / musique
- P. 22 **Anoncoj** / annonces
- P. 23 **Adresaro** / Carnet d'adresses

## ENKONDUKO

(Editorial)

Saluton al ĉiuj !

Comme vous pouvez le constater, votre magazine préféré a changé de rédacteur. Cependant, suite à quelques petits contre-temps et quelques problèmes informatiques, la mise en page a été quelque peu bâclée.

Donc, je vous demande d'être indulgents et je vous promets de faire mieux la prochaine fois.

Sur ce, je vous laisse découvrir le contenu du JI.

Bonan legadon,

Ludivine

P.S. : Envoyez vos contributions pour le prochain JI avant le 15 mai, merci.

## **JEFO** recherche

pour renforcer son équipe d'actifs bénévoles

### Dessinateur jeunesse

*Jeune d'esprit*

Votre mission :

- \* illustrer une revue internationale pour les 8-12 ans;
- \* adapter des dessins à la langue espéranto.

Vos atouts :

- \* première expérience dans un poste similaire appréciée
- \* idéalement connaissant l'espéranto
- \* disponible de suite.

Envoyer sous référence DJK sur la lettre et l'enveloppe, votre dossier de candidature (lettre de motivation manuscrite, échantillon) au siège de l'association.

### Développeurs Java

*Branchés*

Votre mission :

- \* 1er poste: concevoir et réaliser en Java le coeur de l'application d'administration des relations de l'association.
- \* 2ème poste: concevoir et réaliser en Java l'interface utilisateur de l'application d'administration.

Vos atouts :

- \* de formation BAC+5 (école d'ingénieurs ou université);
- \* débutants acceptés, idéalement connaissant l'espéranto;
- \* disponibles de suite.

Envoyer sous référence DJ sur la lettre et l'enveloppe, votre dossier de candidature (lettre de motivation manuscrite, CV) au siège de l'association.

*Bon appétit ...*

### Diététicien/ne

*Fin gourmet*

Votre mission :

- \* constituer les menus d'une Vécande Gastronomique;
- \* suggérer quelques recettes additionnelles sur le thème.

Vos atouts :

- \* grande attention à l'équilibre de l'alimentation
- \* vaste répertoire de recettes inhabituelles mais faciles et rapides à préparer.

Envoyer sous référence RGS sur la lettre et l'enveloppe, votre dossier de candidature (lettre de motivation manuscrite, menus sur le thème du chocolat) au siège de l'association

### Jeunes journalistes

*Plume agile*

Votre mission :

- \* rédiger en espéranto des articles pour les 8-12ans (avec des illustrations);
- \* proposer des jeux, des devinettes et des blagues.

Vos atouts :

- \* 8 à 14 ans;
- \* connaissant déjà bien l'espéranto ou en rapport avec un correcteur.

Envoyer sous référence JJK sur la lettre et l'enveloppe, votre dossier de candidature (lettre de motivation en espéranto, texte (même bref) et son illustration) au siège de l'association

*Un baptême de l'air ?*

### Maquettiste

*Mobile sur sa page*

Votre mission :

- \* mettre en page les bulletins d'inscription aux rencontres;
- \* éditer les indications d'accès aux rencontres (dua informilo)
- \* mettre au format les livrets de recettes des Vécandes Gastronomiques.

Vos atouts :

- \* possédant un ordinateur personnel équipé d'un logiciel de PAO et d'une bonne imprimante;
- \* sachant respecter les délais.

Envoyer sous référence MVG sur la lettre et l'enveloppe, votre dossier de candidature (lettre de motivation, échantillon) au siège de l'association.

### Réacteur

Votre mission :

- \* Réagir aux articles de la presse concernant la jeunesse et l'espéranto
- \* collaborer avec vos homologues d'autres associations espérantophones

Vos atouts :

- \* 18 à 30 ans, avec une pratique active de l'espéranto;
- \* esprit d'équipe;
- \* ayant des facilités d'expression et le sens de la mesure;
- \* connaissant le milieu des médias.

Envoyer sous référence JRS sur la lettre et l'enveloppe, votre dossier de candidature (lettre de motivation manuscrite, CV, participations aux congrès) au siège de l'association.

A suivre ...

*Confidentialité assurée.*

*Alain et Olivier*

# LA LETERO DE LA PREZIDANTO

(Le mot du président)



Karaj legantoj, karaj abonantoj, karaj membroj,

Mi estas aparte tre kontenta saluti vin okaze de tiu nova numero de *Jeunespéranto info* unuafoje redaktita de Ludivine. Jen ŝanco por nia asocio junigi la revuon kaj doni novan energion en niaj aktivadoj. Ankaŭ kelkaj junuloj aperas en diversaj regionoj por agadi kadre de Jefe. Nun estas la taŭga momento, ĉar pluraj aktivuloj de Jefe atingis la administran aĝlimon de 30 jaroj... Kompreneble, ili (feliĉe !) ne forlasis la asocion, sed tamen, ni devas pripensi trovi anstataŭantojn por permesi al ili junigi... la "plenkreskan" asocion, Ufe.

Ĉar estas la unua *Jeunespéranto info* de 1998, mi bondeziras al vi mutkoloran jaron, kun sukceso en viaj aktivadoj kaj vivo.

Ne maltrafu niajn venontajn rendezvuojn: fiŝa semajnfino, vegetara semajnfino, UK kun Festo kiel junulara programo, ĉokolada, pana kaj munĝetada semajnfinoj ...

Antaŭ ol inviti vin legi la ĉi-postajn paĝojn, mi dankas ĉiujn, kiuj helpas en niaj diversaj agadoj, ĉu administraj, ĉu semajnfinaĵoj, ĉu ekspoziciaj, ĉu registaraj, ĉu kunordigantaj...

Sincere via,

Bruno

Vos prochains rendez-vous à ne pas manquer !



**Fiŝa Semajnfino**, à côté de Montpellier et Sète (Montagnac), du 27 au 29 mars. Même si vous n'aimez pas le poisson, vous aurez de quoi vous régaler !

Je rappelle que nous logerons dans un gîte tenu par des viticulteurs qui produisent du Frontignan. Si vous connaissez déjà, pas la peine d'en dire plus sur ce breuvage (à consommer avec modération...), sinon, c'est l'occasion de le découvrir ! Ambiance méridionale garantie ...



**Vegetara Semajnfino**, à côté de Bourg Saint-Maurice (Aime) en Tarentaise, du 17 au 19 avril. Vous êtes tous invités à l'assemblée générale de Jefe qui se tiendra à cette occasion. Une forte présence jeune est souhaitée, alors que se dérouleront à proximité l'assemblée générale d'Ufe, celle de la fédération Rhône-Alpes, rassemblés dans la Trans-Alpa Semajnfino.

Et si vous n'êtes pas végétarien, vous aurez quand même largement de quoi vous nourrir ! Bol d'air pur garanti ...



**FESTO**, à Montpellier du 1<sup>er</sup> au 8 août.

Le congrès mondial d'espéranto a lieu en France après 41 ans d'absence. Événement à ne pas rater en soi, c'est aussi un programme jeune organisé par Jefe, largement impliqué dans l'organisation générale. **POUR LES MOINS DE 20 ANS, L'INSCRIPTION EST GRATUITE !** Pour les autres, les tarifs sont progressifs et il suffit de s'inscrire à l'UK pour participer à Festo. Nous proposons en plus des conditions économiques pour se loger et dîner.

**TOUS LES BULLETINS D'INSCRIPTION À CES RENCONTRES SONT À VOTRE DISPOSITION. DEMANDEZ-LES !**

# **RAPORTO PRI LA 41A IS**

( La Semaine Internationale en Allemagne )

## ***33 français ont participé à la 41<sup>e</sup> Semaine Internationale***

*Les 302 participants, dont plusieurs avaient moins de 20 ans, ont débattu du thème "Société et Communication". La découverte de la région de Traben-Trarbach comprenait la visite de la ville Trier et d'une cave des vins de Moselle. Pour tous régnait une ambiance folle de travail, le jour ; de distraction et de travail encore, la nuit.*

*Pour tous les français, une réunion d'une heure a permis de présenter qui sont JEFO (tous les membres et parmi ceux-ci quelques administrateurs) et ce qui se passe en France. Dans la suite du travail de l'année précédente pour le dépliant en couleurs, nous avons élaboré les textes de la brochure dite "de deuxième niveau" destinée aux personnes ayant déjà reçu le dépliant et qui souhaitent plus d'informations. Cette brochure sera mise en forme par des étudiants de l'école de papeterie de Grenoble. Quelques participants ont aussi travaillé sur la rénovation de notre système d'administration des contacts.*

*Comme vous pouvez le constater ce fut une semaine très intéressante de nombreux points de vue. Mais notre boulimie de travail ne doit pas vous terrifier. Vous aussi amusez-vous pendant la 42<sup>e</sup> Semaine Internationale. Ou bien dois-je d'abord promettre de ne pas y être ?*

## **33 gefrancoj partoprenis la 41an Internacian Semajnon**

El 302 partoprenantoj estis 15 francinoj kaj 18 francoj en Traben-Trarbach. Plej raportindas la partopreno de juna delegacio; malpli ol 20 jaraĝaj homoj ne unuopis. Kelkajn vizaĝojn mi vidis eĉ unuafoje.

Pri la temo de tiu semajno (socio kaj komunikado) okazis multaj prelegoj. Pro samtempeco de kelkaj mi ne povis ĉeesti ĉiujn, kiuj interesis min. Sed oni diskutis poste pri la enhavoj de tiu prelego, kiun oni ĉeestis, kun homoj, kiuj ĉeestis alian prelegon. Socia komunikado pri la temo.

Ankaŭ kutima dum la Internaciaj Semajnoj estas la malkovrado de la regiono. La urbon Trier oni povis ĝui dum unu plena tago. Tio apenaŭ sufiĉas por malkovri ties riĉan historion. Sed la kulturo ne limiĝas al pasinteco kaj dum vizito de vinfarejo oni povis gustumi la nuntempajn kapablojn de regiona vinisto.

Entute estis la etoso de tiu renkontiĝo same freneza, kiel en pasintaj okazoj. Dumtage homoj laboris kaj diskutis pri la temo. Dumnokte ili amuziĝis kaj ankaŭ laboris pri aliaj temoj. Diskutoj tiam estis pli liberaj kaj tute ne malpli viglaj, eĉ je la 3a matene. Inter teo kaj biero eblis pasigi agrablajn noktojn kun amikoj.

Por ĉiuj francianoj okazis unuhora kunveno dum kiu mi prezentis tiujn, kiuj estas JEFO (ĉiuj membroj kaj, inter tiuj, kelkaj komitatanoj), kaj tion, kio okazas en Francio, ne nur far JEFO. Pri tiu lasta punkto eblas distingi kvar kategoriojn, t.e. internaciaj agadoj, renkontiĝoj, regiona reto kaj varbado. Apartaj kunsidoj okazis per, pri kaj por junaj esperantistoj de la entrepreno "La Poste" (sed tio estas alia rakonto alifoj traktota).

Pri la internaciaj agadoj raportis Lisa pri la reapero de la Juna Penso (organo de SAT-Junulfako), Gijom pri la kafejo KoToPo (projekto de la asocio "Mille et une langues") kaj mi (ĉar Catherine ne ĉeestis) pri la gazeteto "La krokodileto" (por infanoj inter 8 kaj 12 jaroj). Pri la renkontiĝoj plej gravas FESTO, nia internacia ĉefaranĝo, kaj regiononivele vigliĝas niaj Gastronomiaj Semajnfinoj. Ankaŭ Scienca kaj Teknika Semajnfino prepariĝas kunlabore kun NEJ, FLEJA kaj GEJ. Pri la regiona reto jam aktiviĝas ses kunordigantoj kaj traktadoj okazas por kvar pliaj regionoj. Pri varbado efikas niaj deĵoradoj ĉe budoj dum salonoj kaj ekspozicioj.

Por helpi al efikigo de niaj deĵoradoj, ni eldonis pasintjare buntan faldfolion. Post la sukceso de la 20000 unuaj ekzempleroj eldonitaj de JEFO, UFE reldonis 50000 ekzemplerojn. Tiun faldfolion ni preparis dum la 40a IS en Freiburg. Por daŭrigi tiun tradicion mi ĉijare laborigis membrojn de JEFO pri la duanivela broŝuro, t.e. konciza kaj kompleta broŝuro por homoj, kiuj jam ricevis la faldfolion kaj deziras pli da informoj. La tekstoj nun pretas dank'al elstara sindonemo de kelkaj homoj. Se mi farus liston, mi forgesus iun ĉar multaj partoprenantoj kontribuis. Tiun broŝuron finpretigos grupo de studentoj pri paperindustrio en Grenoble.

Por helpi al traktado de la kontaktoj, kiujn prizorgas niaj membroj nome de la asocio, ni provas renovigi nian komputilan administrilon. Ĝis nun Laurent sukcesis ĉion trakti tute sola sed la kontaktoj plioftiĝas kaj la enkonduko de la regiona reto ŝanĝas perspektivojn. Ankaŭ pri tiu afero mi cerbumigis kelkajn homojn.

Kiel vi povas konstati, estis tre interesa semajno laŭ multaj vidpunktoj. Sed nia laboremeĝo ne devas timigi vin. Ankaŭ vi amuziĝu dum la 42a Internacia Semajno. Aŭ ĉu mi unue promesu ne ĉeesti tiam ?


Alain



Ne manquez pas la  
**Vegetara Semajnfino**  
du 17 au 19 avril



# TEATRO



## RIDEAU !

Prétendre que faire du théâtre changera votre vie, votre personnalité est ridicule ! Par contre, cela vous permettra d'apprendre à travailler en groupe, assurer votre expression gestuelle, et améliorera la façon dont vous vous exprimez.

Mais comment choisit-on un acteur ?

Comment apprend—on un texte ?

Que ressent un comédien sur scène ?

Si vous voulez le savoir, lisez donc l'article en Esperanto ci-dessous.

## KURTENON !

Mi ŝatus ekkonigi al vi teatron, eble partoprenigi vin en mia gusto por amatora teatro.

Mi ŝuldas tiun pasion al mia instruistino pri la angla, kiu - senkontentigita, ĉar ŝi ne povis fariĝi aktorino -instruis sian denaskan lingvon ludigante al ni ske ĉojn "in english". Kaj mi ekŝatis tion !

## NE LA ANGLAN, TEATRON !

Nun, mi deziras disfaligi iujn enkapigitajn ideojn, kiujn mi regule aŭdas el la buŝo de neiniciitoj. Ekzemple, kredi, ke teatro memfidigos timemulon, ke internemulo fariĝos ekstermulo (konsentite, li akiros pli da aplombo), aŭ ankaŭ ke oni povas laŭplaĉe ŝanĝi sian personecon, kredi tion estas eraro.

## TEATRO NE ESTAS TIO. ĜI ESTAS PLI INTERESA OL TIO !

### Grupa laboro :

Krom monologoj, necesas elekti la teatraĵon, kiun oni deziras surscenigi, trovi la partnero(j)n, kun kiu(j) oni devos provludi dum horoj kaj horoj ekster la kursoj. Fine, bona akordiĝo inter ĉiuj trupanoj estas nepra. Se tiuj kondiĉoj ne

estas respektataj, la publiko sentas tion kaj la teatraĵo fiaskas.

### Laboro pri si mem :

Necesas lerni, kiel labori rilate al la ludo de la aliaj personoj, necesas aŭskulti ilin. Multnombrajn ekzercojn pri la vortoj, la gestoj, la emocioj, aŭ improvizaĵojn oni plenumas antaŭ ol elekti "LA" teatraĵon. Ni konsideru konkretan ekzemplon por montri la malfacilecon. Kiam vi ludas per pilko, vi atentigas la momenton, kiam la alia persono sendos al vi la pilkon, vi prepariĝas ricevi ĝin kaj vi kaptas ĝin en la ĝusta momento. Se vi malsukcesas, ĝi falas. La afero misas. Pri teatro, estas same. Via partnero sendas al vi mesaĝon (vorta aŭ gesta) , vi ricevas ĝin kaj resendas ĝin kiel eble plej nature, zorgante, por ke la afero ŝajnu spontanea, kaj ne ripetante frazon parkere lernitan.

### La voĉo :

Jen denove enkapigita ideo : laŭte paroli por esti aŭdata ne estas la ĉefaĵo de la aktoro. Kio ĉefas, tio estas bone ĝustigi sian voĉon, AR-TI-KI-GI ĈI-UN SI-LA-BON.

La voĉo ne devas eliri de la gorĝo, sed el la ventro, tial gravas la abdomena spirado kaj kompreneble famaj prononcekzercoj tiaj, kiaj : "Mi ŝercas kaj mi serĉas", aŭ "Se ses segiloj kostas cent centimojn, sescent ses segiloj kostas sescent ses centimojn", ktp.

### La korpa lingvo :

70% de la perceptata komunikado originas el la nevorta lingvo. Por esprimi senton, la korpa sinteno, la voĉa emocio, la vizaĝa esprimo kontribuas al la plena fortigo de la teksto. La trafota celo estas viviĝi apartan personon, enpersonigi sin en lin dum kelkaj horoj, fariĝi iu alia nur unu momenton kaj poste trovi sian propran personecon. Tio kondukas min paroli pri la paradokso de la aktoro.



### **La aktora paradokso :**

Se oni devos ludi la rolon de maljunulo, oni dorskurbiĝos, ŝanĝos sian voĉon, malrapidigos siajn gestojn, la manieron sidiĝi ; bona observado kaj imitema sento povas sufiĉi.

Kiam temas pri la esprimo de nekutimaj kaj fortaj emocioj, la aktoro devas superi sin mem, transpasi sian propran sperton. Por bildigi tion, mi mencias la teatraĵon de Orovitch "La kiso de la vidvino". La rakonto temas pri iu virino, kiu retrovas multajn jarojn poste du el siaj liceaj kamaradoj, ŝi iom post iom malkaŝas, ke ili sekserfortis ŝin, kiam ŝi estis adoleskantino. Por ludi tiun rolon la aktorino, krom la kutimaj provludadoj, improvizis kun la aliaj aktoroj la situacion, kiu okazis en la policejo post la sekserfortado ... Ŝi legis multnombrajn artikolojn pri tiu temo : mi spektis la teatraĵon ludata de Agnès Arnaud, tio aspektis ververa !

La tuta malfacileco kuŝas en tio, ke oni eliru el la ludo, ekde kiam la teatraĵo estas finludita, por rekomenci la morgaŭon. Tio ne tiel facilas !

### **Elekti la aktoron :**

Evidentas, ke bela dikulo aspektos pli gajema ol malgrasuleto, ke princino ne estos dorskurba kiel servistino, ke kvardekjara virino ne estos kredinda rolante kiel injeto.

Atenton, mi ne volas sugesti, ke oni ĉiam ludu la saman rolon dum sia tuta vivo. Ekzistas senfina diverseco de tekstoj, kiuj povas esti surscenigitaj por ege malsame esprimitaj sentoj. La ĉefa afero estas ĉiam ŝati tion, kion oni faras, por doni la plej bonon el si mem.

### **Kaj pri la tekstoj ?**

Jen denove demando, kiu tutcerte tiklas vian langon : sed kiel eblas lerni tiom longajn tekstojn?

Estas neniu mirakla recepto, nek elefanteca memoro. Unue necesas kompreni la kaŝitan sencon de la teksto, la ideon, kiun la aŭtoro deziris reliefigi.

Poste necesas laŭte legi ĝin, ripeti ĝin kiel eble plej ofte.

Persone mi surbendigas la tekston kaj mi aŭskultas ĝin, poste mi legas ĝin diversmaniere (malgaje, ĝoje, angore, rapide, malrapide, kolere, ktp.).

Fakte la tri unuaj frazoj estas la plej malfacile memoreblaj, poste la afero tutsole fluas. Kio kuriozas, tio estas, ke post persista provludado kun la partnero, oni fine pli bone konas lian tekston ol sian.

### **La unua prezentado :**

Finfine la tago "T" venas ! Se vi jam partoprenis en sporta konkurso aŭ ekzameno, vi scias, kion mi aludas. Tiun tagon vi ne rajtas memorperdon. Necesas ludi pli bone ol kutime.

Tiam mi uzas "mian ruzon" antaŭ ol eniri la scenejon :

SPIRADI – ampleksa enspirado –  
spirblokado – ampleksa elspirado –

Mia koro ekbatadas rapidege, mi daŭrigas tiel spiradi ĝis ĝi trankviliĝos. Poste, neniu plu problemo. Dum mi ludas, mi atentigas rekte stari, distingeble paroli, ĝisfine plenumi miajn gestojn. Ekde kiam mi estas sur la scenejo, mi ne plu rimarkas la publikon, eĉ se oni tre bone vidas la unuan fotelvicon. Kontraŭe, la publiko ĉiumomente scias memorigi al mi, ke ĝi tieas, per siaj ridoj, kiam temas pri komikaj scenoj. En tiu preciza momento, mi pensas, ke estas sukceso, ili amuziĝas, ili estas feliĉaj. MIRINDE !

La publiko aplaŭdas, la teatraĵo estas finita. Uf ! Ĉio bone disvolviĝis, oni iom ĝojigis ilin dum kelkaj horoj.

Venontjare ni certe rekomencos per alia teatraĵo, kun aliaj geamikoj.

Tamen, estas bedaŭrinde konstati, ke ĉeesti teatraĵon ĝenerale kostas multe...

PS : mia venonta spektaklo okazos la 18an de marto : ĝi estos senpaga !

Ĝis !

Rose Sanz

(tradukis Yves Bachimont)

## EVENTO

### Tago de Eŭropo

*Le 9 mai est le Jour de l'Europe. Faites connaître l'opinion d'Umberto ECO à propos de l'espéranto : efficacité et simplicité optimales. En contactant les journaux, les radios, les journaux gratuits et les télévisions locales, n'oubliez pas de mentionnez toutes les manières pour vous joindre.*

La 9a de majo estas la Tago de Eŭropo (ankoraŭ ne oficiala feritago kvankam kelkaj strebadas al tio). Kion vi tiam faros por Esperanto? En sia libro "A la recherche de la langue parfaite", Umberto ECO esprimas favoran opinion pri Esperanto. Ties ĉefaj kvalitoj estas optimaj efikeco kaj simpleco, kiuj ebligas viklecon. Diskonigu tiun opinion.

La plej simpla afero estas sendi la informdosieron de JEFO al viaj lokaj ĵurnaloj kaj radiostacioj kelkajn tagojn (almenaŭ 10) antaŭe. Tiun dosieron pretigis Bruno ĝuste cele al gazetaro. Vi aldonu leteron por klarigi, ke Esperanto estus taŭga solvo por eŭropuniaj tradukproblemoj kaj por demokratiigo de translimaj kontaktoj.

Se vi estas iom pli verkema, vi povos mem redakti artikolon pri la lingvoproblemo en Eŭropa Unio. En tiu artikolo vi emfazu, ke malgraŭ la deviga instruado de fremdaj lingvoj malmultaj homoj kapablas komunuki per lingvo lernita en lernejo. Kien iras eŭropa frateco per tia vojo? Vian artikolon vi sendu al senpagaj ĵurnaloj (kiel ekz. Le HIC, le 42, le Ciblé, info) almenaŭ du semajnoj antaŭe.




Babilemuloj kontaktu radiostaciojn por intervjuiĝi pri la temo: « Eŭropo kaj Esperanto, ĉu utopioj? ». Esperanto sen Eŭropo jam prosperas. Ĉu Eŭropo sen Esperanto daŭre funkcios? Disaŭdigenda kanto estas tiu de Tutti Frutti « Trans-Eŭrok-Ekspres » (14a sur la unua VinilKosmo-Kompil').

Aktoroj ne fuŝuzu sian talenton ĉe radio dum ili povus aperi ĉe televido. Skandalu ampleksgeŝte pri la sorto de infanoj, kiuj perdos vidkapablon pro manko da mono (investita en pliajn cellingvojn de tradukado). Klarigu kiel simplaj homoj sukcesas plene kompreniĝi sen peranto dum estroj de grandaj firmaoj aŭ landoj bezonas almenaŭ du interpretistojn por plej baza konversacio.

Neniam forgesu mencii ĉiujn manierojn por kontakti vin. Ankaŭ substreku, ke vian opinion vi esprimas kiel junulo celanta pacon kaj interkompreniĝon.

Hameleon?



**tejo**


Tutmonda Esperantista Junulara Organizo

# Dialog



## **TEJO a tenu congrès dans le centre de l'Italie**

Dialog - novembro 1997



*La 53a IJK okazis ĉi-somere en la belega urbeto Assisi, en Italio. Krom la tema programo menciindas riĉa vespera programo kaj kulturplenaj ekskursoj.*

C'est à Assisi, superbe ville du centre de l'Italie, où est né Saint François, que s'est déroulé le 53ème Congrès International de la Jeunesse fin juillet. Le thème du congrès n'était pas sans rapport avec le saint homme: «L'homme fait-il partie de la nature ou est-il au dessus?»

Le thème à été illustré par de nombreuses conférences. Le père Gustavo Zanoli, de l'ordre des Bénédictins, a expliqué le point de vue chrétien. Daithi Ó hÉalaithe, irlandais, écologiste et représentant du parti des Verts à Dublin, a donné une conférence sur les racines de la crise écologique. D'autres conférences ont traité, entre autres, la situation actuelle en Europe, sous les titres «entre l'argent et les peuples» de Umberto Broccatelli et «modèle d'une évolution supportable» de Harro von Blottnitz.

Cependant, au-delà des conférences, le congrès a offert à ses participants de superbes promenades où les guides d'Assisi ont conté l'histoire de l'époque romaine jusqu'au Moyen Age et plus tard. Les habitants d'Assisi ont de plus présenté un concert choral. Les espérantophones les ont remerciés par un concert de Kajto, groupe de musique folklorique traditionnelle, célèbre parmi les espérantophones. Le programme de soirée était particulièrement riche avec, entre autres, une pièce de théâtre grandiose et plusieurs concerts, tous en espéranto.

Les congressistes ont passé des moments agréables et particulièrement intéressants, et n'ont pas pu s'empêcher de ressentir émotion et tristesse en repensant au récent tremblement de terre qui a frappé Assisi et ses habitants.



## **TEJO a un nouveau bureau!**

*Ekde la kongreso en Assisi TEJO havas novan estraron - jen ĝiaj anoj...*

Une nouvelle équipe enthousiaste a pris en main les affaires courantes de TEJO après les élections à Assisi. Les T-shirts bleus, comme ils se sont présentés pendant le congrès de TEJO de cet été, ont commencé à travailler avec ardeur depuis quelques mois. Voici leurs noms et leurs postes:

**Joseph Truong** (président) <jtruong99@hotmail.com>, <jtruong@loyola.edu>

**Jimmy Stryhn Meyer** (vice-président, relations extérieures, séminaires) <stryhnmeyer@hotmail.com>

**Miquel Gómez i Besòs** (vice-président, congrès, culture) <a2982765@smail1.rz.Uni-Koeln.DE>


**Reza Torabi** (vice-président, action nationale) <irejo@neda.net>

**Jeroen Balkenende** (secrétaire général) <jeroen@rulgm0.LeidenUniv.nl>

**Pascal Lécaille** (trésorier, action nationale) <pascal.lecaille@wanadoo.fr>

**Attila Kaszás** (préparation des actifs) <zcentrum@mail.matav.hu>

**Sjoerd Bosga** (information) <sjoerd@esperanto.se>





## Séminaire sur le thème de "L'information" à Budapest

*Tre sukcesa pro sia praktika utileco estis la TEJO-seminario pri informado en Budapeŝto.*

Une semaine durant, un groupe de membres de TEJO a traité le thème de "L'information" sous tous ses aspects. Le séminaire a eu lieu du 27 avril au 4 mai au Centre Européen de la Jeunesse (EYC) de Budapest. Les participants ont beaucoup apprécié les activités du programme, où ils ont dû mettre en pratique immédiatement les connaissances qu'ils venaient d'acquérir, en écrivant des articles, en interviewant des séminaristes et en parlant en public. Cette dernière activité a beaucoup plu, car les participants étaient filmés, pouvaient se voir ensuite et corriger leurs erreurs.

Une collaboration étroite avec les mass-média locaux a permis plusieurs visites d'étude de divers journaux, stations de radio et de télévision de la capitale hongroise. De plus les entretiens sont passés plusieurs matins durant la semaine dans des émissions de radio de diverses stations hongroises.

Les participants ont également eu la possibilité de faire connaissance avec Budapest grâce aux promenades et activités nocturnes; et de jour, grâce aux visites des lieux les plus importants de la ville malgré un programme très chargé.

Le séminaire était brillant, avec des participants très actifs et laborieux et il est certainement recommandé de répéter ce type de rencontre au CEJ, pour la bonne ambiance qui y règne et les conditions favorables qu'offre le centre aux organisateurs.



## Les occupations d'un jeune espérantiste cet été

*Ĉi-somere denove estis abunda elekto por juna esperantisto. Ĉu IJK, IJS, FESTO, aŭ tamen la UK en Aŭstralio? Nun oni jam songas pri venonta somero. Sed okazos ankoraŭ multo antaŭe!*


L'été 1997 offrait encore une fois un vaste choix de rencontres destinées tant aux jeunes qu'aux moins jeunes, mais toujours en espéranto bien sûr! Zita, de Lituanie, a vite fait son choix: d'abord IJK en Italie (le congrès officiel de TEJO), puis FESTO, dans le sud de la France. "Ce sont LES congrès où je pourrai revoir tous mes amis et passer des super vacances". Le congrès en Italie était aussi le premier choix de ceux qui s'intéressent à la culture et à l'histoire. "Nous avons eu une chance incroyable de visiter la ville d'Assise avant les tremblements de terre de cet automne", raconte Palma, de Hongrie. Mais elle ajoute que le congrès était plutôt cher. Evidemment, la Semaine Internationale des Jeunes, organisée chaque année par la section hongroise de TEJO, est un superbe exemple d'une rencontre qui combine la qualité et les bas prix! Cependant on pouvait aussi visiter l'Italie à bon marché en participant aux deux chantiers archéologiques.

Cet été, le Congrès Universel d'Espéranto a eu lieu à Adélaïde (Australie). Avec seulement 1224 participants, c'était un Congrès plutôt modeste. Près de la moitié des participants venaient d'Australie, de Chine et du Japon. "Quand chacun doit payer son voyage, un congrès mondial ne peut pas prétendre représenter également chaque partie du monde". Les jeunes de Chine, du Japon et de Corée ont pu profiter au mois d'août du 16e *Komuna Seminario*, organisé cette année par la section TEJO de Corée.

Les préparatifs pour l'été prochain vont bon train. En plus du congrès de TEJO à Rijeka (Croatie), on organise un programme spécialement pour les jeunes dans le cadre du Congrès Universel de Montpellier (France). Un autre événement important en Europe: le Festival Culturel Espéranto, organisé par les jeunes de Suède. Mais l'été prochain est encore loin. D'ici là, il est encore temps de participer à d'autres rencontres, comme la *Montkabana Renkontiĝo* (rencontre en montagne), des week-ends de ski, les séminaires de TEJO, les festivals, et - la rencontre de jeunes la plus importante en hiver - le Séminaire Internationale, en Allemagne.



# La krokodileto



N° 1 - Printempo 1998

Sezona gazeto por la plej junaj esperanto-parolantoj

*Jen...*

paĝo 2

Viaj leteroj  
Novaĵoj el Esperantio

paĝo 3

Novaĵoj el la mondo

paĝo 4

Dokumentaro : la venĝo  
de la krokodilo

paĝoj 5 kaj 6

Rakonto :  
la terura militisto

paĝo 7

Pri libroj  
Abonilo

paĝo 8

Ludoj  
Konkurso

## Enkonduko

*Karaj geamikoj !*

*Jen la unua numero de "La Krokodileto". Vi retrovos vian amikon la krokodileto, kiu multe laboris por vi. Ne forgesu, ke ĝi atendas viajn kontribuaĵojn. Vi povas partopreni sendante bildojn, leterojn, artikolojn, kantojn, ludojn, ktp... La krokodileto (sed kiun nomon ni donu al ĝi ?) esperas, ke vi ĝojos la legadon de ĉi-tiu gazeto.*

### Dokumentaro :

**La venĝo de la krokodilo**

Paĝo 4



### Milito en Eŭropo :

**Cipro**


Paĝo 3



### Rakonto :

**La terura militisto**

Paĝo 5



### **R e d a k t a d o :**

*Catherine Giangrossi • B.P. 3019 • FR-69394 Lyon cedex 03 • Francio  
tel.+faks.: +33/0 4 72 36 07 14 • retadreso : pascal.lecaille@wanadoo.fr*


**Desegnaĵoj :** Leo. **Enpaĝigo :** Pascal Lécaille. **Kontribuantoj :** Nadine Rivière, Bruno Flochon, Konrad Hinsen...  
Trimonata gazeto eldonata de JEFO (Junulara Esperantista Franca Organizo).  
Supplément à JeunEspéranto Info • ISSN 265 3853 • Direktoro de la eldono : Bruno Flochon.

## Viaj leteroj

*Vi amas, vi ne amas, vi konsentas aŭ ne konsentas... Se vi volas demandi pri iuj aferoj, reagi pri evento, informo aŭ artikolo, skribu al mi ! Sendu ŝercaĵojn, desegnaĵojn, rakontojn, ktp. Ankaŭ plenkreskuloj povas skribi artikolojn. Vi ankaŭ povas fari korespondopetojn.*

"La Krokodileto"

Catherine Giangrossi  
B.P. 3019  
FR-69394 Lyon cedex 03  
Francio



### Korespondpetoj

Misa Lebenzon (12-jara),  
A/K 39-91,  
RU-690035 Vladivostok, Rusio.

Mercedes Garcia Martinez (12-jara),  
C/Vincente Lunel 1-2 A,  
ES-30800 Lorca Murcia, Hispanio.

Juan Pedro Ortega Martinez (12-jara),  
Vereda de la Palma Tercia,  
ES-30800 Lorca Murcia, Hispanio.

Mariely Fernandes Garcias (12-jara),  
Calle 4/31 Santa Olaya, Villa Clara,  
CU-53000 Santo Domingo, Kubo.

donitaj de Koresponda Servo Mondskala, p/a  
s-ro François-Xavier Gilbert, B.P. 6, FR-55000  
Longeville-en-Barrois, Francio.

Flugas birdo super herbejo  
super arbaro  
Flugas kiel sago  
eligita el arko  
Ĵetas ombron sur montojn  
herbejojn  
kampojn, lagojn kaj marojn  
Jen birdo de l'paco  
blanka kolombo  
de la espero.

*Grzegorz Gora* (10-jara).

el "La vojo al Revoj",  
(Antologio de polaj infanpoezioj).  
elĉerpita el Revuo ICEM-Esperanto n°85.




2

## Novaĵoj el Esperantio

### 14-a Printempa Lernejo Internacia

Ĝi okazos inter la 6-a kaj la 13-a de aprilo en Bonn (Germanio). Ĝi estas speciala aranĝo por gejunuloj inter 10 kaj 16 jaroj. Aliĝilo kaj informoj ĉe Wolfgang Bohr, Johannes Kirschweg-str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr Ahrweiler, Germanio.



### Infana kongreseto en Francio

Dum la kongreso de SAT-Amikaro (11-13 aprilo 98 en Saint-Brieuc, Francio) okazos kongreseto por infanoj de 6 ĝis 14 jaroj, 15 minutojn piede de la kongresejo. Programo : pentrado de paskaj ovoĵ, spurludo, kantoj, ludoj, fabeloj, manfarado, ktp... Ni prezentos al la kongresantoj la rezulton de nia kongresa laboro (ekspozicio, kantado...). Informoj ĉe Denis-Serge Clopeau, 6 rue J.-P. Calloc'h, FR-22000 St-Brieuc, Francio, tel. +33 2 96 94 08 54.

### 31-a Internacia Infana Kongreseto


Samtempe kun la Universala Kongreso en Montpellier (1-8 aŭgusto 98) je 30 km, alia kongreso, sed por infanoj, okazos en granda 18a-jarcenta domo kun bela ombra parko. La programo estos tre diversaspekta (muziko, desegnado, kukbakado, paperfaldado, teatro, diskuttrondetoj, sportoj kaj ludoj...) Ni planas ekskurson al la mediteranea maro. Aliĝilo ĉe Christopher Fettes, Saint-Columba's College, Dublin 16, Irlando.

### Infanprizorgo dum UK

Dum la Universala Kongreso okazos infanprizorgo en ĉambro de la kongresejo. Tiu nova servo akceptos bebojn kaj infanojn ĝis 8 jaroj. Estos aktivecoj laŭ la aĝoj (pentrado, desegnado, perlumado, modla pasto, konstruaĵoj, sporto, rondodancoj, ktp...). Estos ripozmomento por la beboj ĝis 4-jaruloj posttagmeze. La ejo estos malfermita de la 9a ĝis la 17a kaj 30 (fermita inter 12.15 kaj 13.45). Gepatroj partoprenos almenaŭ duontagon. Estos tre familia etoso !



# Novaĵoj el la mondo




Medio kaj industrio

## Elteni ĝis 2050

La ozona tavolo detruigas iom post iom pro la industriaj misuzoj malgraŭ la interkonsentoj inter la ŝtatoj.

Dek jarojn post la protokolo de Montreal (Kanado), kiu malpermesis uzi KFK, gaso kiu detruas ozonon, la nombro de landoj, kiuj subskribis tiun kontrakton, estis en la komenco 24 kaj nun ili estas 163. La uzo de HKFK, malpli danĝera, ne tute kontentigas, kaj en multaj landoj oni daŭre kontraŭleĝe uzas KFK. Oni esperas, ke la problemo ĉesos kreski je la jaro 2000. Tiuj gasoj supreniras tre malrapide, do oni certe devos



La sunaj radioj UV (ultra-violo aŭ trans-violo) povas trapasi la ozonan tavolon, kiam ĝi enhavas malpli da ozono, pro la detruo kaŭzita de la gasoj. La ozona tavolo troviĝas en la stratosfero (inter 15 km kaj 35 km super la grundo de la Tero).

atendi ĝis 2050 por ke la situacio pliboniĝu. De 1979 ĝis 1994, la denseco de la ozono super la Antarktiko jam duoniĝis.

**Protokolo** : Oficiala raporto. En ĉi tiu artikolo, oni parolas pri personoj, kiuj skribis la komunajn

regulojn por respekti ozonon.

**KFK** : Familio de gasoj, kies molekuloj konsistas el kloro, fluoro, kaj karbono. Vaste uzata en malvarmigiloj (fridujoj, ktp.).

**HKFK** : Familio de gasoj similaj al KFK, sed enhavantaj ankaŭ hidrogenon. Ili havas similajn aplikojn, sed estas pli kostaj kaj / aŭ malpli efikaj.



Milito en Eŭropo

## Cipro

La insulo Cipro situas apud turkia marbordo en Mediteraneo. Ĝi ofte estis invadita de Romanoj, Britoj, Turkoj, Grekoj...

Cipro fariĝis sendependa ŝtato en 1960. De pluraj jarcentoj, Cipro estas loĝata de Grekoj kaj Turkoj. En 1974, grekaj militistoj invadis Cipron por havi la potencon. Ilia celo estis konkeri

tiun sendependan ŝtaton por ke ĝi fariĝu greka teritorio. Turkio rapide sendis siajn militistojn al la nordo de la insulo. Estis pli ol 3500 mortintoj dum tiu milito.


### Norko kaj sudo

De 24 jaroj, Cipro estas dividita en du partoj kun netranspasebla landlimo. La suda parto de la insulo, regata de Grekoj, nomiĝas Respubliko de Cipro, oficiale rekonata de ĉiuj aliaj ŝtatoj de la mondo. La norda

parto, sub la kontrolo de Turkio, nomiĝas la Turka Respubliko de Norda Cipro, rekonata nur de Turkio.

### Ĉu traktadoj ?

Tiu dispartigo malkvietigas la internacian komunumon. Iam ajn povas okazi milito inter ambaŭ malamikoj. Tial, oni faras traktadojn por rekunigi ambaŭ partojn. Cipro refariĝus unika kaj sendependa ŝtato regata de grekaj kaj turkaj Cipranoj. En majo 98, Eŭropanoj devos decidi, ĉu Cipro povas membriĝi en Eŭropa Unio. Sed tiu aliĝo ne sukcesos se la insulo estas ankoraŭ dividata.



**Sendependa ŝtato** : kiu ne estas sub la aŭtoritato de alia lando.

**Eŭropa Unio** : grupo de 15 landoj, unuiĝintaj per la samaj politikaj kaj komercaj reguloj.

**Internacia komunumo** : ĉiuj landoj de la mondo, kiuj povas ekzemple doni sian opinion en Unuiĝintaj Nacioj (UNo).

## La venĝo de la krokodilo



Vi eble demandas vin, kial la nomo de tiu ĉi gazeto estas "La Krokodileto". La krokodilo ne estas tiom bona simbolo en Esperantio... Andreo Cseh (1895-1979, Hungario) kreis metodon por lernigi Esperanton kaj inventis la verbon "krokodili" (paroli

nacilingve en esperanto-parolanta medio). Fakte, kiam la lernantoj parolis nacilingve dum la kursoj, Andreo svingis teatropupon, kiu estis krokodilo. De tiam, esperantistoj ne plu ŝatas krokodilojn ! Dank'al tiu gazeto, tiu fakto ŝanĝiĝos !

Mi volas klarigi pri mia vivmaniero. Kiu mi estas **Nomo** : krokodilo.

**Ordo** : krokodiluloj. Mi havas malvarman sangon, do mi bezonas multe da suno.

**Klaso** : rampulo. Krokodilo estas la sola rampulo el dinosaŭraj tempoj, kiu pluvivis sensanĝa ĝis nuntempo.

**Predanto** : Multaj homoj kredas, ke mi estas homvoranto, sed fakte ne !

### Patrino kaj beboj

La patrino, kiu pezas proksimume 400 kilogramojn, enŝovas siajn ovojn en sablon ne for de akvo. Ŝi prizorgas la neston dum 90 tagoj kaj fojfoje lasas ĝin por bani sin rapide.



*eloviĝo de la krokodiletoj*

Kiam la beboj baldaŭ eloviĝos, ili vokas sian patrinon, kiu devas rompi la ŝelon por helpi ilin.

Kiam la beboj eloviĝas, ili longas 30 centimetrojn kaj jam havas ĉiujn dentojn, sed ne scipovas naĝi. La patrino prenas ilin tre delikate en sia faŭko en speciala poŝo por protekti kaj porti ilin en la akvon. Oni ofte vidas la bebojn sur la dorso de la patrino : ili sunumas. Ŝi prizorgas siajn bebojn dum ankoraŭ ses monatoj.

### Manĝaĵo

La beboj manĝas insektojn kaj ili povas resti sen manĝi dum pluraj semajnoj, ĉar ili havas sufiĉe



da fortoj. La plenkreskaj krokodiloj manĝas ranojn, fiŝojn, kaj kelkfoje mamulojn. Sed, ili ne multe manĝas : unu granda manĝo ĉiusemajne.

### Malamikoj

Stilzobirdoj manĝas pli ol duono de la beboj, kiuj ne estas prudentaj. Varanoj rompas la ovojn kaj manĝas la bebojn. Ankaŭ la plenkreskaj

krokodiloj manĝas la bebojn kelkfoje. Alia malamiko : homoj kiuj transformas la krokodilojn en mansakojn ! Efektive, la krokodiloj havas tre dikajn haŭton (proksimume 100 skvamoj kaj ostecaj platoj), kiu protektas ilin kontraŭ sekeco. Bedaŭrinde ĝi ankaŭ fariĝas tre bona ledo por mansakoj !



En Ugando (Afriko), en 1955, restis 7000 krokodiloj. En 1969, eĉ ne restis unu krokodilo ! Oni mortigis ĉiujn. Oni scias, ke la lastaj liberaj krokodiloj (proksimume 500) estas ĉe la lago Turkana (Kenjo, en Afriko). Homoj ne kuraĝas iri al tiu sovaĝa regiono.

### Krokodiloj en malnova Egiptio

En Egiptio, krokodiloj estis konsiderataj kiel dioj. Oni vestis ilin per oro ĉar oni diris, ke ili liberigis la sunon ĉiumatene. Kiam ili mortis, oni mumiiĝis kaj entombigis ilin kun la reĝoj. Ankaŭ ekzistis urbo, kiu nomiĝis Krokodilopolis.



# Rakonto

## La terura militisto (afrika fabelo)



Un belan matenon, raŭpo enŝteliĝis en la bestotruon de iu leporo dum tiu ĉi ludis sur la

herbejo. Ĝi instaligiĝis

plej taŭge en angulo

la plej varma kaj

malluma kaj atendis.

La leporo poste

revenis, vidis la

spurojn lasitajn sur la grundo kaj komprenis

ke kiam ĝi foriris, iu eniris ĝian domon. Ĝi

demandis per timema voĉo :

- Kiu entrudiĝis en mian domon ?

La timemo de la leporo estis ankoraŭ pli

granda kiam ĝi aŭdis teruran voĉon kiu

respondis al ĝi :

- Mi estas sovaĝa militisto, la filo de la ĉefo

de la Lando-kiu-ne-ekzistas. Mi neniigas la

rinocerojn kaj mi dancas sur la korpoj de la

elefantoj ; mi estas nevenkebla.

Tremante pro la timo, la leporo forkuris plej

rapide for de sia bestotruo plendante pro sia

malfeliĉa sorto.

"Kion mi povas fari, mi besteto, kontraŭ besto

kapabla venki rinocerojn kaj elefantojn ?"

Sur la pado, la leporo renkontis ŝakalon.

- Amiko, ĝi diris al la ŝakalo, ĉu vi volus helpi

min ?

- Volonte, sed pri kio temas ?

- Venu al mia hejmo kaj parolu al la

feroca besto kiu instaligiĝis en mia domo.

La ŝakalo akceptis. Kiam ili alvenis antaŭ



la bestotruo, ĝi kriis laŭtvoĉe :

- Kiu aŭdacis eniri en la hejmon de mia

amiko la leporo ?

La raŭpo, per la sama terura voĉo,

respondis :

- Mi estas sovaĝa militisto, la filo de la

ĉefo de la Lando-kiu-ne-ekzistas. Mi

neniigas la rinocerojn, kaj mi dancas sur la

dorsoj de la elefantoj; mi estas

nevenkebla.

Tuj post kiam la ŝakalo aŭdis tiujn parolojn,

ĝi forkuris balbutante :

- Mi ne povas batali kontraŭ tiu terura

militisto.

La leporo, senespera, iris por trovi la

leopardon kaj petis ĝin veni por paroli al la

besto kiu okupas ĝian domon.

La leopardo bonvolis. Sed tuj post kiam ĝi

aŭdis la respondon faritan al sia demando,

la leopardo diris al la leporo:

- Amiko, se tiu militisto povas venki la

rinocerojn kaj la elefantojn ĝi ankaŭ

dispremos min.

Kaj ĝi foriris kaŝante sian teruron.

La leporo ekserĉis la rinoceron:

- Terura militisto okupas mian bestotruon,

kial vi ne venus paroli al ĝi, vi kiu estas tiel

forta ?

La rinocero flatita, tuj iris al la

bestotruo de la leporo kaj kriis plej

laŭte :

# Rakonto (sekvo de la dorsa paĝo)


- Kiu estas vi, kiu okupas senrajte la domon de mia amiko la leporo ?

La raŭpo, ne timigita, respondis per terura voĉo :

- Venu, juna rinocero, mi estas sovaĝa militisto, la filo de la ĉefo de la Lando-kiu-ne-ekzistas. Mi neniigas la rinocerojn, kaj mi dancas sur la korpoj de la elefantoj.

Malgraŭ sia forto, la rinocero malkvietiĝis kaj per mallaŭta voĉo diris al la leporo:

- Ĝi asertas, ke ĝi povas disrompi min. Mi preferas foriri.



**6** La leporo, pli kaj pli senespera, rigardis la rinoceron per malhela okulo. Poste, ĝi kuris al la elefanto.

- Elefanto, vi nun estas mia lasta espero. Venu paroli al la terura militisto, kiu okupas mian domon. Ĝi asertas, ke ĝi povas venki la rinocerojn kaj danci sur la korpo de la elefantoj.

La elefanto, dealte rigardante la leporon, diris:

- Mi ŝatus helpi vin, sed mi volas, ke neniu dancas sur mia korpo eĉ se ĝi estas la plej terura militisto de la tuta arbaro. Ĝis revido, amiko.

Kaj ĝi foriris fiere, lasante la malfeliĉan leporon afliktitan.

Je tiu momento, iu rano pasis antaŭ la bestotruo de la leporo. Vidante la leporon senesperan, ĝi demandas kio okazas al ĝi.

- Se vi scius, balbutis la leporo, kiom malfeliĉa mi estas. Mia bestotruo estas

okupata de la terura militisto, kiu povas venki la ŝakalon, la leopardon, la rinoceron kaj eĉ la elefanton.

- Sed kiu do estas tiu kuraĝa militisto?

- Ĝi asertas, ke ĝi estas la filo de la ĉefo de la Lando-kiu-ne-ekzistas.

- Mi volus koni tiun militiston, kiu povas venki ĉiujn bestojn de la tero.

Kaj la rano alproksimiĝis al la enirejo de la domo kriante:

- Kiu aŭdacis penetri en la domon de mia amiko?

Kaj la raŭpo respondis:


- La plej kuraĝa militisto, la filo de la ĉefo de la Lando-kiu-ne-ekzistas. Mi venkis ĉiujn bestojn, mi timigis la rinocerojn kaj mi dancis sur la korpo de la elefantoj.

La rano saltis internen de la bestotruo kaj iris en la angulon de kie venis la terura voĉo kaj diris :

- Finfine, mi trovis kontraŭulon indan je mi.

Kiam la raŭpo vidis la ranon alvenantan, ĝi ektimis kaj diris per mallaŭta voĉo :

- Indulgu min, rano, mi nur estas malfeliĉa raŭpo.



La rano prenis la raŭpon kaj montris ĝin por ke ĉiuj bestoj vidu la beston.

Sed la aventuro estis tiel ridiga, ke neniu pensis venĝi kontraŭ la raŭpo.

Kaj multajn jarojn poste oni ankoraŭ parolis pri tiu ĉi historio.

*Tradukaĵo de Nadine Rivière (Nantes, Francio)*




## Rakontoj

Teksto kaj ilustraĵoj de Pierre Varenne, esperantigis Henri Ménéard.

Temas pri 20 albumetoj, kiuj ekzistas ankaŭ en la franca, germana kaj la angla. La tekstoj estas tre amuzaj : oni trovas ekzemple rakontojn pri moskitoj, pri la hundo Bobi, pri heliketoj, pri ĉasado de fungoj ! Kaj bona ideo : la serio eĉ entenas leksikon.

Mendebla ĉe Eld. Odilon, 8 rue de Bruneau, Les Chollets, FR-89100 Naily. Unu serio kostas 200 FRF.



## La knaboj de kastora rivero

Verkis Jaroslav Foglar, tradukis el la ĉeĥa lingvo Dieter Berndt.

Grupo de junaj knaboj mezuras sian forton kaj kuraĝon en plej diversaj aventuroj. Estas tre vigla rakonto, kiu donas impreson ke oni povas venki ĉion. Por la bravaj geknaboj, se ekzistas tiaj.

Mendebla ĉe Universala Esperanto-Asocio.

|                 |   |
|-----------------|---|
| Kiu mi estas ?  | Persona nomo : _____<br>Familia nomo : _____<br><input type="checkbox"/> knabino <input type="checkbox"/> knabo naskiĝdato (jj/mm/tt) : _____<br>adreso : _____<br>_____ lando : _____<br>tel. : _____ retadreso : _____  |
| Kion mi volas ? | <input type="checkbox"/> mi volas aboni <i>La Krokodileto</i><br>4 numeroj : 30 FRF / 10 NLG / 6 IRK<br><input type="checkbox"/> mi volas iĝi subtena abonanto <i>La Krokodileto</i><br>4 numeroj : 50 FRF / 17 NLG / 10 IRK<br><input type="checkbox"/> mi volas aboni al <i>La Krokodileto + Juna Amiko</i><br>4 numeroj : 80 FRF / 27 NLG / 16 IRK<br><input type="checkbox"/> mi volas esti membro de JEFO por la sama prezo (mi loĝas en Francio kaj estas malpli ol 14 jaroj). Mi ricevos mian membro-karton. |
| Kiel mi pagas ? | <input type="checkbox"/> per ĝiro aŭ ĉeko al PoŝtĉekKonto / CCP "La Source" 31.709.94 Y je la nomo de "Esperanto-Jeunes" _____ FRF<br><input type="checkbox"/> per mia UEA-konto _____ al JEFO-V _____ NLG<br><input type="checkbox"/> per IRK (Internaciaj Respond-Kuponoj) _____ IRK<br><input type="checkbox"/> per francaj poŝtmarkoj _____ FRF<br><input type="checkbox"/> per moneroj _____ FRF   |




## Kiel aboni ?

1. Plenigu la apudajn kadrojn, respondante al la tri demandoj.
2. Resendu viajn pagon kaj abonilon nur al :

"La Krokodileto"  
 Catherine Giangrossi  
 B.P. 3019  
 FR-69394 Lyon cedex 03  
 Francio



- La abono validos ekde la sekvanta numero tuj post la pago.
- Kontrolu sur la etikedo, se via abono jam finiĝis !
- Se vi sendas artikolojn, desegnaĵojn, ktp, kaj se ili aperas, vi estos abonanto por la du sekvantaj numeroj.
- Se vi ne povas aboniĝi, ne hezitu rilati pri tio kun la redakcio.



## La rompita kvadrato

En la kvadrato, estas sep formoj.

- Vi kopiu aŭ distondu ilin.
- Algluu ĉiujn partojn sur fortan kartonon kaj kolorigu ilin.
- Poste vi uzas ilin por refari la desegnaĵon de la vulpo.



La solvon vi trovos en la venonta numero. Konservu ilin, ĉar estos aliaj bildoj en "La Krokodileto".

8


## Konkurso

Jen krucenigmo dekstre, kiun vi povas plenumi per la vortoj, laŭ la desegnaĵetoj de bestoj.

Ne necesas tondi, vi povas resendi kopiante la kvadratojn kaj skribi viajn respondojn en ilin. Kaj sube aldonu vian respondon al la kroma demando: kiom da krokodiloj troviĝas en ĉi-tiu numero de "La Krokodileto"?

Resendu viajn respondojn al Catherine (adreso sur la unua paĝo aŭ sur la abonilo). Tiu, kiu resendos antaŭ la 1-a de junio 1998 gajnos albumon de Aksteriks la Gaŭlo. Ni lotumos inter la respondintoj.

*Catherine D'Amico*





## Le 16ème Séminaire Commun à Yongin

*En Yongin, Suda Koreio, okazis la 16a Komuna Seminario. Partoprenis 67 junuloj el 5 landoj. Ĉi-jare, la temo estis "Esperanto en la 21a jarcento".*

Depuis déjà 16 ans, le Séminaire Commun se déroule régulièrement entre les jeunes espérantophones coréens et japonais. Depuis 1994, alors que le séminaire était partie intégrante du congrès de TEJO, les chinois se sont joints à l'équipe d'organisation.

Le Séminaire Commun est une bonne opportunité pour les jeunes des trois pays de se rencontrer. Dans le même temps, il est la base pour des relations plus poussées pour les associations de jeunes espérantophones en Asie.

Les principaux thèmes de ces séminaires sont souvent liés à l'amitié et à la compréhension mutuelle. Cette année le thème était «l'espéranto au 21ème siècle», traité par des conférences des représentants des associations de jeunes espérantophones japonais, coréens, chinois et iraniens. Malheureusement les représentants chinois n'ont pas réussi à participer en personne cette fois-ci.

